Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO, NOVEMBRO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@bigpond.com
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Sonoras la telefono en la fajrobrigadejo. Histeria virina voĉo kriegas: "Venu, venu rapide, brulas ĉi tie !"

Respondas trankviliga voĉo de fajrobrigadisto: "Ĉu vi provis surverŝi akvon?"

"Jes, sed tio ne helpis."

"Do, ni ne bezonos veni, ankaŭ ni havas nur akvon !"

Gravaj Esperanto-eventoj:

Sabaton la 24an de oktobro, je la 17a horo, okazos la populara kantofesto ĉe Indrani. Bonvolu kunporti iom da manĝaĵo kaj trinkaĵo !

Merkredon la 4an de novembro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko. Parolos Pat kaj Bob.

Sabaton la 7an de novembro, ni solvos kvizojn ĉe Trevor.

De vendredo la 27a ĝis lundo la 30a de novembro AEA okazigos sian kongreson en Kanbero.

Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko.

Sabaton la 12an de decembro, je la 17a horo, ĉe Indrani, ni festos la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Ni petas vin kunporti iom da manĝaĵo kaj trinkaĵo plus etan donacon okaze de la naskiĝtago de la Majstro !

La AEA-somerkursaro okazos en Sidnejo de dimanĉo la 10a ĝis lundo la 25a de januaro 2010.

La Novzelanda Kongreso okazos en Velintono de mardo la 26a de januaro 2010.

La UEA-kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 la AEA-kongreso okazos en Adelajdo. Kiel sciate, la unua AEA-kongreso okazis en belega Adelajdo en la benita jaro 1911.

Universala Esperanto-Asocio kongresos en 2011 en Kopenhago. Kia bonŝanco, ĉu ne? Ni estos devigataj elekti inter du el la plej belegaj urbegoj de la mondo !!!

Povas esti neniu dubo pri tio, ke mia nova hundo estas io tre speciala! Kaj kiel gardohundo li estas nekredeble bonega! Se mi dumnokte aŭdas ion suspektindan, mi simple vekas la hundon, tiam ĝi bojas !

Elna Matland honorata de lia reĝa moŝto

La norvega reĝo decidis ke la esperantistino, Elna Kristine Matland en Bergeno, ricevu la Reĝan Arĝentan Medalon pro Merito.

Elna Matland faris ĝis nun eksterordinaran kontribuon al la norvega socio per sia laboro kiel instruistino, per sia laboro por la faka sindikato kaj ankaŭ en volontulaj organizaĵoj kaj postenoj ĉe la lokaj aŭtoritatoj.

Precipe, dum 70 jaroj ŝi aktivis kaj ankoraŭ aktivas en la loka, nacia kaj internacia Esperanto-movadoj. Lerninte Esperanton en 1939 ŝi plenumis amason da postenoj kaj taskoj, i.a. ŝi prezidis la klubojn de Bergeno kaj Sauda, ŝi estis prezidanto de Norvega Esperanto-Ligo, komitatano A de UEA, kaj ŝi prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de la Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno en 1991, en kiu partoprenis 2.400 esperantistoj el 60 landoj.

Eĉ hodiaŭ Elna Matland aktive partoprenas per programeroj kaj paroladoj en lokaj kaj naciaj aranĝoj, kaj ŝi ankoraŭ estas delegito de UEA en Bergeno.

Malmultaj nunaj norvegoj, se iu ajn, tiom profunde influis la norvegan Esperanto-movadon kiom Elna Matland.

La vicguberniestro de Hordaland, Rune Fjeld, komisie de la Reĝo transdonis la medalon dum aranĝo en Bergeno la 18an de septembro. La aranĝon gastigis Norvega Esperantista Ligo.

El "Norvega Esperantista Ligo"

Post pluraj provoj pagigi ŝuldanton la ŝuldato skribis la sekvan leteron:

”Mia sinjoro! Ĉar mia sekretariino estas sinjorino, mi ne povas dikti al ŝi sufiĉe taŭgajn vortojn, kaj ĉar mi estas ĝentilulo, mi ne povas uzi sufiĉe maldecajn vortojn, kvankam mi tion deziras. Sed ĉar vi estas nek sinjorino nek ĝentilulo, vi devus facile kompreni tion, kion mi ŝatus komprenigi al vi!”

Nekutima Esperanto-Kunveno

Okazis septembron la 27an ĉe la familio Steele. Katja invitis la Esperantist*inojn* por lerni floraranĝadon (unu el ŝiaj talentoj). Ŝi aranĝis la manĝejon kun amasoj da floroj, folioj diversaj, sekigitaj kaj freŝaj, vazoj, multaj bezonataj iloj kaj kromaj aĵoj.

Unue Katja montris kiel fari la diversajn stilojn de floraranĝado kaj poste ni mem provis.

Komence mi aŭdis: *”mi ne povas, mi ne havas talenton”* ktp., sed je la fino ĉiuj estis tre kontentaj pri siaj diversaj kreaĵoj – vidu la bildon! Ni virinoj estas tre dankaj al Katja pro tiu posttagmeza kunveno, kiu okazis tute en Esperanto dum la edzoj en alia ĉambro *krokodilis* – fi al ili !

Indrani

En malnova bieno, sur la rando de la lito sidas du maljunaj geedzoj. Ili pretas enlitiĝi, sed tie ili sidas ripozante kaj parolante post longa tago da laboregado en la kampo: ”Viaj piedoj estas multe pli malpuraj ol miaj,” diras la edzino. ”Jes, sed ne forgesu, ke mi estas plurajn jarojn pli aĝa ol vi,” respondas la edzo.

”Diru al mi, s-ro biletkontrolisto, ĉu estas sufiĉe da tempo por ke mi adiaŭu mian edzinon, antaŭ la foriro de la vagonaro?”

”Tio certe dependas de tio, kiom longe vi estas edziĝinta!”

Nova estraro en EFNSK

Ĵaŭdon la 24an de septembro oni elektis novan estraron en Esperanto-Federacio de Novsudkimrujo. La eĉ tre ĝojiga rezulto estas, ke ekde nun prezidantas Roger

Springer, vicprezidantinas Nicole Else, kasistas Alan Turvey, kaj sekretariinas Margaret Chaldecott. Aliaj estraranoj estas Dmitri, Martin Gray kaj Jonathan Moylan.

Esperanto en Sudaŭstralio elkore gratulas al ili ĉiuj !!!

Eta Søren vesperpreĝis al Dio. Lia patro aŭskultis ĉe la pordo.

"Kara Dio, bone zorgu pri Panjo, bone zorgu pri Paĉjo kaj ĝis al Avo." La sekvantan tagon mortis la avo. La patro de Søren longe kaj profunde, fakte plurajn semajnojn, pripensis pri tio, ĉu la malĝojiga okazaĵo povus esti la rezulto de la stranga vesperpreĝo de Søren.

Pasis la tempo, kaj kelkajn monatojn poste, ĝuste kiam Søren vesperpreĝis, la patro preterpasis la pordon de la dormoĉambro de Søren. La patro aŭskultis iomete kaj aŭdis: "Kara Dio, bone zorgu pri Panjo, kaj ĝis al Paĉjo !"

Malvarmega ŝvito aperis sur la frunto de la patro, ĉar li ankoraŭ memoris tion, kio okazis al la maljuna avo. La sekvan tagon li ne kuraĝis iri aŭtomobile al sia laborejo. La tutan vojon li promenis tre proksime al la dommuroj. Li ne transiris la straton ĝis ĉiuj aŭtomobiloj estis for, kaj li supren iris laŭ la ŝtuparo la tutan vojon al sia oficejo sur la 7a etaĝo. Dum la manĝopaŭzo li rifuzis tuŝi la manĝaĵon, kaj li rifuzis eĉ akcepti siajn klientojn. Ĉirkaŭ la 17a horo li malsupren iris laŭ la ŝtuparo kaj kaŝiris hejmen laŭ la plej hommalplenaj stratoj, kiujn li povis trovi. Sekure hejmen veninte li sidiĝis en brakseĝo dirante: "Ho, Marta, - tiu estas lia edzino - se vi nur scius kian teruran tagon mi havis."

"Vi povas paroli", diris Marta, ĉu vi kredas ke mi havis pli bonan tagon? Ĉi matene la poŝtisto falis mortinta sur la kuiregan plankon!"

Projekto por Esperanto aprobita

En kunsido la 16an de septembro la komisiono pri Edukado de la brazila Senato aprobis leĝprojekton, kiu permesos/instigos la instruadon de Esperanto en mezlernejoj, laŭ la ekzisto de deziranta lerneja komunumo.

Tio signifas, ke ĝi povas iri rekte al la Deputita Ĉambro (malalta ĉambro de la Parlamento) por pridiskutado kaj voĉdonado aŭ eventuale unue aprobiĝi en la pleno de la Senato. Mi ne scias, ĉu estas limdato por unu aŭ alia vojo.

La informo troviĝas en la antau ne longe lanĉita noto: 15/09/2009 – 14h16 – COMISSÕES/Edução Esperanto poderá ser disciplina facultative no ensino médio (Esperanto povos fariĝi laŭelekta mezgrada lernobjekto) de la senata novaĵagentejo.

http://www.senado.gov.br/agencia/verNoticia.aspx?codNoticia=95294&codAplicat ivo=2

En tiu noto oni reliefigas la favoran voĉdonon de la raportinta senatano, laŭ kiu Esperanto ”povas signifi instigon al paco inter la landoj”. La noto indikas ankaŭ, ke kontraŭ ĝi voĉdonis senatanoj Gerson Camata (el federaciero Espirito Santo, kies guberniestro li iam estis) kaj Roberto Cavalcanti (el federaciero Paraiba, entreprenisto). Laŭ Camata, temas pri “senutila projekto”, ĉar tiu, kiu lernos Esperanton ne havos aliajn parolantojn, kun kiuj li povos ekzerci la novan lingvon.

Se oni volas saluti la decidon de la komisiono, la prezidanto estas senatano Flavio Arns, flavioarns@senador.gov.br. La adreso de la oficisto Julio Linhares, kiu sekretarias la laborojn de la komisiono, estas julioric@senado.gov.br.

Amike,

James (James Rezende Piton, UEA-ĉefdelegito por Brazilo kaj Komitatano A.

Postskribo: Ne malutilos se oni alvokos reagojn kaj montros al tiu misinformito, ke ne mankas Esperanto-parolantoj en la mondo. Se vi bonvolos tion fari, skribu al gacamata@senador.gov.br kaj robertocavalcanti@senador.gov.br kaj eble ankaŭ kopie al la novaĵagentejo: agencia@senado.gov.br

Pri la afero oportune kunmetis koncizajn informojn Lu Wunsch-Rolshoven ĉe http://www.esperantoland.org/eo/novaĵoj.php?lingvo=eo&ekde=0#nov1001

Male al tio, kion ni supozis, la decido de la komisiono ja estas fina en la Senato, escepte se ene de kvin tagoj almenaŭ naŭ senatanoj subskribos peton, ke la afero estu voĉdonata de la pleno. Post tio ĝi iros al la deputita ĉambro, kie ĝi bezonos aprobon, kaj en tiu okazo ĝi dependos de la sankcio de la respublika prezidento.

Sed la aprobo en la diverspartia komisiono kaj la aŭtoreco de la fama fakulo pri edukado jam estas aparta venko.

Grava brazila semajnmagazino jam aperigis artikolon en sia elektronika versio fine de la tago:

http://revistaepoca.globo.com/Revista/Epoca/0,,EMI93275-15223.00.html

Promenas Adamo kaj Eva en Edeno. Subite demandas Eva: ”Adamo, ĉu vi amas min?”

Respondas iom surprizite Adamo: “Jes, kompreneble, kiun alian en la mondo mi povus ami?”

Esperanto-renkontiĝo en vagonaro

En junio 2010 estos organizita pervagonara vojaĝo tra Rusujo survoje al la 6a Azia Esperanto-Kongreso en Mongolujo en 2010. Jam pretas kunvojaĝi proksimume 10 esperantistoj el Francujo, Italujo, Germanujo. Ili aŭ jam vagonarumis survoje al Universala Kongreso en Jokohamo, Japanujo en 2007, aŭ informiĝis pri la efektivigota vojaĝo ”Esperanto-karavano”.

Tiu vojaĝo de Moskvo aŭ Sanktpeterburgo tra Siberio – apud la lago Bajkalo ! – daŭros 10-12 tagojn, do ĝi en si mem estos ekskluziva Esperanto-renkontiĝo...

Itinero de la Esperanto-karavano al Mongolujo estas ankoraŭ provizora kaj ĝia konkretiĝo dependas de preferoj de partoprenontoj. Oni elektu unu el variantoj. La varianto, kiu kolektos plej da jesoj, estos efektivigita. La prezoj de la vojaĝo certe surprizos kaj allogos vin!

Pliajn detalojn kaj konkretan retpaĝon pri la speciala evento oni trovos en junio 2010 en la ”Internacia Kalendaro de Esperanto-aranĝoj” ĉe http://www.eventoj.hu.

Havigis al si firmaogvidisto privatan flugmaŝinon por siaj komercaj vojaĝoj. Iun matenon la flugmaŝino falis teren ĝuste super lia domo, kaj la firmaogvidisto devis elsalti per paraŝuto. Sed bedaŭrinde rompiĝis la ŝnuroj, kaj la paraŝuto flugetis for. Li do falis ĉiam pli kaj pli rapide, kaj stulte gapis, kiam li renkontis sian edzinon, kiu supren flugis.

”Ĉu vi vidis mian paraŝuton?” kriegis la firmaogvidisto.

”Ne,” kriegis la edzino. ”Ĉu vi vidis mian premkuirilon?”

”Aldone al la intervjuo de Katja Steele en la pasintmonata Tamen Plu, mi, Marcelo Leereveld, ŝatus diri, ke mi havis, dum miaj regulaj somerkursaraj instruadoj en

Adelajdo, la plezuron kaj honoron dufoje gastigati ĉe Margaret.

Tamen Plu serioze pardonpetas pro la forgeso mencii ankaŭ la nomon de plia gasto ĉe Margaret Furness dum la somerkursaroj. Margaret forgesis mencii, ke ŝi gastigis ne nur Marcelon Leereveld el Melburno sed ankaŭ Vera Payne el Perto.

Aĉetanto al la vendisto: "Vi asertas, ke tio ĉi estas pura lano, sed sur la etikedo estas skribite, ke ĝi estas kotono."
La vendisto: "Jes, sed tio estas nur por trompi la tineojn!"

Pormondpaca marŝado

La 2an de oktobro – la naskiĝtagon de Mahatmo Gandhi – komenciĝis en Velintono, Novzelando, 90-taga marŝado kontraŭ ĉia formo de perfortoj fizika, ekonomia, rasa, religia, kultura, seksa kaj psiĥologia.

Oni elektis Novzelandon pro ĝia internacia renomo kiel pacamanta nacio.

Grupo de 25 marŝantoj tramarŝos 95 landojn dum 90 tagoj.

Ili tramarŝos militdetruitajn teritoriojn ekzemple Israelon kaj Bosnion. La marŝado finiĝos en Argentino.

Aldonas Bradley McDonald ke "en Aŭklando estis aranĝita bonveniga ceremonio kaj marŝeto en la urbocentro dimanĉon la 27an de septembro.

Poste UNANZ, Esperanto, Oxfam, Greenpeace, Internacia Amnestio, loka virina grupo (avinoj maoriaj) kaj pluraj aliaj organizaĵoj partoprenis distran programon. Bona etoso helpata de ĉeestado de studentoj studantaj pri "administrado de eventoj" – okazo por kunlaborado inter pacaktivuloj."

Estas bone vidi, ke finfine la mondcivitanoj kuraĝas publike montri sian starpunkton. Se ĉiuj rifuzas partopreni militojn kaj aliajn perfortojn, mensogojn ktp., ni ne plu bezonus soldatojn kaj policistojn. Imagu kiom pli bona la mondo estus. Soldatoj ne plu bezonatus, ĉar junuloj, jes, kaj ankaŭ junulinoj ne bezonus invadi aliajn landojn por detrui

konstruaĵojn kaj mortigi senkulpajn kaj sendefendajn homojn. Sed la problemo estas, kiel konvinki niajn registarojn pri tio? Ili nur tre malfacile komprenas, kvankam ili regule preĝas en la preĝejoj, ke estas peko mortigi. Tamen ili bone, eĉ bonege, komprenas, ke ili ne mem persone bezonas mortigi iun ajn. Ili rajtas ja devigi nian junularon eliri al fremdaj landoj kaj mortigi tie dum ili mem povas resti hejme en relativa sekureco. Ili ne volas akcepti, ke ili, la registoj, mem respondecas pri la mortigo de tiom da junuloj samlandaj kiel ankaŭ eksterlandoj. Kaj ne nur gejunuloj, sed ankaŭ plenkreskuloj kaj gemaljunuloj!

Iun tagon revenas edzĉjo post kelkhora fiŝkaptado. Li tuj enlitiĝas por dormeti.

Kvankam nefamiliara kun la apuda lago, la edzino tamen decidas iomete boateti sur ĝi. Do, ŝi motoris etan distancon, ankris, kaj eklegis sian libron.

Venis fiŝgardisto en sia propra boato. Li apudigis ĝin kaj ankris. ”Bonan matenon, sinjorino. Kion vi faras?”

”Legas libron,” ŝi respondis.

”Sed vi estas en fiŝkaptlimiga zono,” li informis ŝin.

”Pardonu min, sinjoro, sed mi ne fiŝkaptas, kiel vi povas vidi, mi legas.”

”Ho jes, sed vi ja havas la tutan ekipaĵon; povas esti, ke vi iumomente komencos. Laŭleĝe mi devas akuzi vin.”

Se vi faros tion, mi laŭleĝe devos akuzi vin pro seksatako,” diris la virino.

”Kion vi diras? Sed mi eĉ ne tuŝis vin! Ekkriis la fiŝgardisto.

”Vere, sed vi ja posedas la tutan ekipaĵon; povus esti, ke vi iumomente komencos!”

”Feliĉan tagon al vi, sinjorino,” diris la fiŝgardisto forboatante.